

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2009 numero 4-a: novembro-decembro
dissendo je la 29-a de oktobro



Fotis Claude Gacond

La fungoj koprinusoj anoncantoj de la frosta sezono

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2010-1 : januaro-marto :

januare 10, dissendo 1-an de februaro.

2010-2 : aprilo-junio :

marto 10, dissendo 1-an de aprilo.

2010 3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2010-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto, Esperanto-
Servo, PF 262, 4132 Muttensz 1. Tel.: 076 460
89 92. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2009-4 - Redaktis: Stefano Keller

Estraranoj kaj membroj de SES aktivas ĉe UN en Ĝenevo



UEA-representantoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, Charmian Common, Stefano Keller, Mireille Grosjean kaj Cesco Reale konversacias kun la estro de la UN-Oficejo de rilatoj kun NRO-j (foto: Stefano Keller)

Ekde septembro 2009 plilarĝiĝis la teamo de la surloke aktivaj reprezentantoj de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Per la alveno de Mireille Grosjean, du estraranoj de SES troviĝas en la grupeto plenumanta tiun laboron por Universala Esperanto-Asocio.

La taskoj de la UEA-representantoj ĉe UN estas: informadi pri la lingvo kaj movado esperantaj, krei kontaktojn kaj okazojn de kunlaboro kun similcelaj neregistaraj organizaĵoj, akiri prestiĝan lokon ene de la rondo de NRO-j grupiĝantaj en CoNGO (Conferenco de Neregistaraj Organizaĵoj). Krome, grava parto de la laboro estas prezenti al la Homrajta Konsilio (HRK) kazojn de malrespekto de lingvaj rajtoj.

Dum septembro du eventoj okazis en la Palaco de Nacioj, kiujn ni partoprenis: la kunsido de la 2-a Socia Forumo de la HRK kaj la 12-a sesio de la Homrajta Konsilio. Kadre de tiu sesio Mireille Grosjean prezentis nome de UEA kazojn de malrespekto de lingvaj rajtoj, sed ankaŭ gratulis pozitivajn evoluojn tiuterene en aliaj landoj.

La filmetoj de la intervenoj ĉe UN estas spekteblaj en la retejo de www.youtube.com/EsperantoTv Krome, kelkaj diverslingvaj dokumentoj, sonregistraĵoj, informoj rilataj al tiuj intervenoj kaj eventoj, kune kun aliaj novaĵoj pri la stato de lingvaj rajtoj en la mondo estas troveblaj en la retejo de UEA pri la Agado por Lingvaj Rajtoj (ALR): www.lingvaj-rajtoj.org



***La venontjara Ĝenerala Kunveno
de Svisa Esperanto-Societo
okazos la 17an de aprilo 2010***

Bonvolu jam rezervi la tagon por tiu evento de nia societo. Informoj pri loko kaj pliaj detaloj aperos en la venonta numero de SES informas.



Donacoj ricevitaj dum junio - septembro 2009

S-ino Nancy Fontannaz, Pully (1'000) - S-ino Andrée Gacond, La Chaux-de-Fonds (30) - S-ro David Buhlmann, Prilly (30) - Ges-roj Ernest kaj Geneviève Gäumann, Saules (25) - S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20) - S-ro Alois Koller, Zürich (30) - S-ino Verena Mallepell, Minusio (50) - S-ro Hans Meier, Basel (30) - S-ino Madeleine Noser, Zürich (10) - S-ro Marc Vigny, Petit-Lancy (50) - S-ino Marguerite, Viredaz Lausanne (5).

Entute: CHF 1'280.- Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de SES!


Novaj patronoj de SES, 2009

S-ino Mariola Jobin, Le Locle; S-ino Andrée Gacond, La Chaux-de-Fonds; S-ro John Hasler, Ostermundigen; S-ro Alois Koller, Zürich; S-ino Marie-Louise Münger, Môtiers; S-ino Suzanne Streit, Givrins.



SFERO 2009 estis granda sukceso

49 homoj kaj 1 hundo el Svislando, Francio, Germanio kaj Pollando partoprenis la 2-an Svisan Familian Renkontiĝon en Lenk en Simme-Valo en Berna Oberlando.



35 plenkresuloj kaj 14 infanoj ĝuis dum 3 tagoj de la 16-a ĝis 18-a de oktobro 2009 en la alpa vilaĝo Lenk amikan familian etoson en Esperantujo. La organiza teamo de Wolfram, Mara, Daniel kaj Nelida ebligis per sia giganta laboro riĉan programon por la etaj kaj maletaj partoprenantoj. Vendrede ni profitis de la bela vetero kaj migradis al la 7 fontoj de la rivero Simme supre de Lenk. Je la fino de la posttagmezo honoris nian renkontiĝon per sia ĉeesto la komunuma prezidanto. Post bona vespermanĝo en la renkontiĝejo

okazis interkona vespero, dum kiu ĉiuj sin prezentis laŭ familioj. Sabate okazis diversaj aktivecoj, atelieroj, Esperanto-kurso kaj posttagmeze ankaŭ ekskurso al la vilaĝa naĝejo. La vesperon konkludis bunta programo kun teatro de la infanoj. Dimanĉe denove okazis diversaj kursoj kaj dume filmis teamo de la loka berna televido Telebern.

Gajnantoj de la SES-Konkurso 2009

Sabatposttagmeze en la kadro de SFERO ekzamaniĝis la partoprenintoj de la konkurso lanĉita de SES en printempo. Gajnis la tri ĉefpremiojn (vojaĝon al NR dum jarfino) laŭvice Ailen Bilat. (ina, 1995), Sacha Bilat (vira, 1998) kaj Sami Bapté (vira 1994), ĉiuj gelernantoj de la lernejo *La Grande Ourse* en La Chaux-de-Fonds.



Tutsvisa aktiveco

Kultura Festo

**koncerto, recitoj kaj prelegoj
honore al L. L. Zamenhof naskiĝinta antaŭ 150 jaroj
Sabaton 7an de novembro**

CDELI - Biblioteko de la Urbo - La Chaux-de-Fonds, Progrès 33

Programo de tiu jubilea festo-tago

10.00 : Malfermo de la salono de CDELI kun eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

11.00 : Malfermo de la Aŭlo.

11.30 : En la Aŭlo :

**Koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral, soprano, kun la pianisto
Wolfram Fischer. Poemtradukoj de Dominique de Mestral.**

13.00 : Komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14.30 : **Prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof.**

15.15 : Paŭzo.

15.30 : **Premiado** de partoprenintoj al la Kultura Seminario kaj sub la gvido de **Claude Gacond** laŭtleĝo, fare de esperantistoj el tuta Svislando, de **citaĵoj el la paroladoj kaj verkoj de L.-L. Zamenhof**, kiuj atestas pri la daŭra aktualeco de la penso de la iniciatinto de la Lingvo Internacia.

16.00 : Konkludaj vortoj.

16.15 : En la CDELI-salono : **Konkluda teumo** kaj amika babilado, libroservo.

17.30 : **Oficiala fermo.**

(Por la kovrado de la organizaj kostoj estos petita partoprenkotizo de fr 10.-)

**Nepre partoprenu tiun jubilean festadon de la 150a naskiĝjaro de
Zamenhof.**

(Detalaj informoj pri la koncerto kaj la prelego sur la sekvaj paĝoj)

Koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral, soprano kun la pianisto Wolfram Fischer

Poemtradukoj de Dominique de Mestral

11.30 en la Aŭlo sametaĝa al la CDELI-salono en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

La tri romandaj kaj alemana esperantistoj Elisabeth kaj Dominique de Mestral kaj Wolfram Fischer kunlaboras por malkovrigi al la esperanto-publiko kantojn el la repertuaro de la francaj melodioj, kies komponistoj vivis en la tempo de L.L. Zamenhof (fino de la 19a kaj komenco de la 20a jarcentoj).

Elisabeth de Mestral komencis kanti en eklezia koruso kaj studis pianon kaj poste kantadon ĉe la Muziklernejo de Montreux. Paralele al sia komerca studado ŝi daŭrigis sian primuzikan fakiĝon en la profesiaj klasoj de la Ĝeneva Muziklernejo. Ŝi estris la koruson *La Caecilia* en Montreux et perfektigis sekvante staĝojn pri malnova muziko en Francio kaj pri *Lieder*-kantado en Vieno (Aŭstrio). Ŝi soliste kantas dungita de korusaj koncertoj aŭ de orkestroj en preĝejoj kaj muzikaj festoj. En 2007 ŝi kreis la *Svisan Koruson*.

Wolfram Fischer studis pianon en alemana Svislando dum deko da jaroj. Paralele li profesiigis komputikistike. Ekde pli ol 20 jaroj li plenumas la funkcion de orgenisto akompananta korusojn kaj muzikistojn.

Dominique de Mestral, la tradukisto de la kantotaj poemoj, efektivigis beletrajn, prilingvajn kaj primuzikajn studojn, kiuj vekis en li viglan intereson al la lingvoj latina, greka, franca, germana, angla, rusa kaj itala, kaj nun esperanta. Esperantigo de poemoj estas por li aktiveco riĉiga kaj ludkaraktera.

Programo, kies kant-tekstoj estos disdonataj al la koncertpartoprenantoj :

Bela vespero Impresionisma etoso kaj invito ĝui la vivon	Beau soir	Claude Debussy
Apud' river Kviete iu paro songas...ĉio forpasas krom eterna am'	Au Bord de l'eau	Gabriel Fauré
La Kera reĝino Lunluma songado pri ludkarto	La Reine de cœur	Francis Poulenc
Kia Aventuro ! Kio okazas, kiam pulo promenigas elefanton !	Quelle Aventure !	Francis Poulenc
Se Memoroj rilate la "Pontojn Se", aludoj al eventoj ekde la mezepoko ĝis la dua mondmilito	C	Francis Poulenc

La Knabinoj de Kadiks'	Les Filles de Cadix	Leo Delibes
Kiel sedukti la fierajn kaj viglajn hispaninojn !		
Kanto malgaja	Chanson triste	Henri Duparc
Amo resanigas vundojn...		
Serenado	Sérénade	Charles Gounod
La paroloj, kiujn oni ŝatus aŭdi de sia kunulo aŭ kunulino		
Belulin' daŭre nea	Oh! Ma Belle rebelle	Charles Gounod
Sopiro de iu trubaduro por iu necedema belulino		
Aprila Kazon'	Chanson d'avril	Georges Bizet
Ĝoja zumado de la printempo : vekigo de la vivo kaj amo !		
Mi havas 2 amantojn	J'ai 2 amants	André Messager
La virinoj multe ŝatos tiun kanton, la viroj iomete malpli...		
La Vojoj de l'amo	Les Chemins de l'Amour	Francis Poulenc
Sur ritmo de valso, dolĉaj rememoroj pri la unua amsperto		
Fratineton ni volas	Les Petites sœurs	Francis Poulenc
Kiam infanoj elektas fratinton, kiel kristnaskan donacon !!		

-oOo-

Prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof

14.30 en la Aŭlo sametaĝa al la CDELI-salono en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

La **prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof** konsistos el tri eroj :

- 1. Ruslando je la zamenhofa epoko.**
- 2. Esperanto en la cara Ruslando.**
- 3. Esperanto en Sovetio.**

Sébastien Moret estas kunlaboranto en la Sekcio pri slavaj lingvoj ĉe la Laŭzana Universitato, kie troviĝas rondo de esploristoj pri la prilingva historio en Centra kaj Orienta Eŭropo. Kadre de tiu fako li interalie efektivas esplorojn pri interlingvistiko kaj pri esperanto en Sovetio, kaj pri la historio kaj epistemologio de la artefaritaj lingvoj ĝenerale.

-oOo-

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claud.gacond@ne.ch,
martine.schneller@ne.ch,
nancy.fontannaz@ne.ch

Grava donaco

Dum sia vojaĝo en Japanio Mireille Grosjean konstatis, ke la CDELI-kolekto de la prizamenhofaj verkoj de Ludovikito ne estas kompleta. Kaj per malavara donaco de Fr 500.- kaj aktiva kunlabora interveno ŝi

ebligis la kompletigon de tiu libro-kolekto, kiun nuntempe la bibliotek-istino Martine Schneller katalogas.

CDELI esprimas grandan dankon al Mireille Grosjean.

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **novembre 21 kaj decembre 12 : interaktiva zamenhofa festo, 2010 januare 16, februare 20, marte 20, aprile 24, majo 29, junio 19.**

Raporto pri la seminario pri paco de la 3a de oktobro.

Sub la aŭspicio de SES kaj de la Svisa Sekcio de ILEI, Mireille Grosjean iniciatis la kunvokon ĉe CDELI de seminario pri la paco, kiun partoprenis deko da interesatoj.

Resumo pri la matena programo

Mireille Grosjean enkonduke atentigis, ke la esperanta vorto PACO havas latinan devenon bone rekoneblan ankaŭ en la lingvoj itala, hispana kaj aliaj latinidaj lingvoj. La germana formo «Frieden» estas retrovebla en la skandinaviaj kaj aliaj ĝermanaj lingvoj. La rusa formo «Mir» pli malpli samforme aperas en la slavaj lingvoj. En la aliaj lingvo-familioj ekzistas plej diversaj vortformoj esprimantaj la ideon PACO.

Estas malfacila kaj vasta problemo difini la ideon paco. Certe oni pensas unue pri malĉeesto de milito. Milito estas perforto. Sed ekzistas multaj aliaj formoj de perforto. Ekzistas plie struktura perforto, kiu inkluzivas mankon de vivrimedoj. Tre resume kaj skeme por difini la nocion PACO oni povas diri respekto, solidareco, toleremo, amo.

La scienco pri PACO nomiĝas en Esperanto pacologio, en la franca *irénologie*, en la germana *Friedensforschung*, en la angla *peacestudies*.

Nuntempe Mireille Grosjean esploras tiun fakon pacologio en kunlaboro kun Profesoro Okamoto en Hiroshima kaj Profesoro Terajima en Oosaka, Japanio.

En pac-edukado oni povas difini tri aksojn :

Unue instruisto devas interveni, kiam montriĝas okazo. Ekzemple se la instruisto aŭdas iun insulton, li / ŝi povas fermi siajn orelojn kaj ne reagi. Tio ne estas la bona solvo. Li / ŝi povas ĉesigi la insulton per ordono. Ankaŭ tio ne estas la bona solvo. Se li / ŝi aŭdas ekzemple « Ĉiuj blondulinoj estas stultaj ! » aŭ « Ĉiuj Turkoj estas ŝtelistoj ! », li / ŝi povas demandi : « Sur kio vi baziĝas, kiam vi asertas tion ? » Poste ekas diskuto. Tio estas la bona solvo.

Due la instruisto devas kapti la okazon meti iun ideon pri paco, tio estas respekto, solidareco, toleremo, amo, en iujn ekzercojn. Instruisto pri lingvoj havas multajn tiajn okazojn. Li / ŝi devas verki multajn ekzercojn kaj devas atenti pri la enhavo de ĉiu frazo.

En Japanio Mireille Grosjean ekzemple devis starigi paroligajn rondojn. Ŝi ĉiam metis konfliktajn situaciojn en la rolludojn ; la partoprenantoj devis iel elturniĝi en tia situacio kaj mem elpensi solvon.

Trie oni povas meti en la instru-programon kurson pri pcedukado, pri konflikto-solvado. Tiam paco estas en la kerno de la leciono, ĝi fariĝas LA ĉeftemo.

Post tiuj didaktikaj konsideroj Mireille Grosjean konklude raportis pri kelkaj organizoj pri paco. Jen tiurilate utilaj informoj :

- « Lernejo ilo al la Paco » (*Ecole Instrument de Paix*), ĉefsidejo en Ĝenevo. www.cifedhop.org (*Centre International de Formation à l'Education aux Droits de l'Homme et à la Paix*). Tre abunda dokumentaro troviĝas sur tiu ĉi retejo.
- « Senperforta komunikado » laŭ Marshall Rosenberg. Tre efika maniero komuniki pace.
- ASEPAIX, *Association Suisse des Educateurs à la Paix*, Svisa Asocio de Edukistoj Pacen. www.asepaix.ch
- Kurso pri konflikto-solvado. Ekzistas en la franca ĉe www.edukado.net kaj ĉe www.asepaix.ch . Mireille Grosjean intencas helpi al geinstruistoj en la tuta mondo metante sur la Reton aktivecojn celantajn edukadon al paco en Esperanto. Tiel iuj povos elŝuti ilin kaj fari ilin kun siaj lernantoj.
- Alvoko Al Mondpaco (AMO) estas kolekto de subskriboj sur la Reto. Vidu www.alvoko-al-mondpaco.org
- „Curriculum“, kompleta programo celanta edukon al la paco, de Mirejo Grosjean, ekzistas ĉe www.edukado.net kaj www.asepaix.ch en kelkaj lingvoj.

Resumo pri la posttagmeza programo

Posttagmeze Mario Bélisle prelegis pri la kvakeroj kaj pri iliaj agadoj rilate al paco.

La « kvakeroj » estas la membroj de la Religia Societo de Amikoj, kiun George Fox fondis en la 17-a jarcento en Britio. Nuntempe, 350 jarojn poste, la kvakeroj nombras ĉirkaŭ 300'000 personojn en la mondo. En Svislando ili nuntempe estas inter 180 kaj 200 personoj (vidu → www.swiss-quakers.ch). Kvankam nemultaj, pro sia kuraĝa sinteno la kvakeroj havas grandan influon porpacan.

En la komenco la kvakerismo radikis ĉefe en la kristana mondo, sed ĝi rapide krevis la limojn de la tradiciaj dogmoj propraj al la kristanismo. Nun ekzistas ne-kristanaj kvakeroj. Tio ĉar ili opinias, ke dia revelacio povas okazi ĉiam kaj ĉie. Eĉ troviĝas agnoskaj (*non-theist*) kvakeroj ! Elstaraj diferencoj inter la Amikoj kaj tradiciaj kristanoj estas, ke :

- (a) ili pli forte akcentas la individuan respondecon,
- (b) kredas, ke ĉiu homo povas senpere rilati al la dia fonto;
- (c) celas reveni al pura kristanismo absolute sendogma, do sen la aldonaj kredoj disvolviĝintaj en la eklezioj. Ili rifuzas partopreni en ia ajn militado. Ili ne ĵuras, ĉar tio supozigus, ke ili ne ĉiam dirus la veron. Ili ne praktikas ritualajn sakramentojn pro sia konvinko, ke la tuta vivo estas sakramenta.

Ĉe iliaj religiaj kunvenoj, kiuj povas okazi ie ajn, troviĝas neniu pastro, neniu preĝlibro aŭ ceremonio : ĉiu ĉeestanto, ĉu viro aŭ virino, kunvenas en plena egaleco, sub gvido de la Spirito. La kunvenoj disvolviĝas plejparte en kompleta silento.

Mario BÉlisle menciis diversajn librojn pri la kvakeroj aperintaj en Esperanto, interalie precipe pri la verkoj « La Fundamentoj de la Kvakerismo » de Caroline Stephens eldonita en 1890, kiun esperantigis Montagu Butler en 1916; « La Kvakeroj » de Edouard Dommen, tre bona libro por konatiĝi ankaŭ kun la nuntempaj kvakeroj, kiun esperantigis Jacqueline Lépeix ĉirkaŭ 1996. Eĉ ekzistas Kvakera Esperantista Societo, kiu fondiĝis en 1921 kaj ankoraŭ ligas siajn membrojn ne plu per Esperanto-bulteno, sed per interreta dissendolisto.

Mario BÉlisle tre interese prezentis la kvakerajn vivo-principojn, kiuj asertas : « *Viaj vivoj parolu* » por emfazi, ke « *pli bone praktiko sen doktrino, ol doktrino sen efiko* ». Tra la historio de la kvakerismo la vivoj de la kvakeroj ĉefe *parolis* en la formo de kelkaj famaj sintenoj, nomataj *atestoj*. Tiuj estas interalie paco, egaleco, vero, kaj simpleco.

Pere de kelkaj ekzemploj la partoprenantoj malkovris iom pli detale la kvakerismon de interne. Ekzemple, ke kvakeroj fondis Pensilvanion kaj redaktis ĝian konstitucian tekston, kiu poste influis la konstitucion de Usono ; ke kvakeroj troviĝas inter tiuj, kiuj fondis la organizaĵojn Internacia Civilservo *Service civil international* = SCI, *Oxfam*, *Amnesty international*, *GreenPeace* kaj instigis al diversaj aliaj gravaj pac-agadoj. Ili ankaŭ luktis kontraŭ sklavismo kaj por la egaleco inter viroj kaj virinoj, por digna pritraktado de la psikaj malsanuloj, de la malliberuloj, de la kriplaj maljunuloj kaj de la infanoj. Tiuj agadoj tra la tuta historio de la kvakeroj atestas pri iliaj internaj ideoj.

La preleganto ankaŭ konklude menciis, ke inter la svisaj esperantistoj gravas la aktiveco de Pierre Cérésolle kaj Edmond Privat, kiuj estis tre aktivaj kvakeroj.

KCE

Kultura Centro Esperantista
Esperanto-Domo, Strato Postiers 27,
Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
Tel. & fakso: 032 926 74 07.
esperantio.net

Programo

Decembre 13 : Zamenhofa Tago
kun akcepto de lokaj kleruloj, ne-
esperantistoj kaj prezento de la Aktoj
de la Simpozio pri Homaranismo.

Januare 30-31: Asembleo de KCE
kaj Monاتفino kun la temo **Inter
hagiografio kaj historiografio: ĉu
eblas sincera biografio de**

Zamenhof? Aleksander Korĵenkov,
la ĉefredaktoro de *La Ondo de
Esperanto*, estos la ĉefa preleganto.
Li pritraktos tri erojn:


a) La patro kaj la filo kun ankoraŭ
nekonataj informoj pri Marko
Zamenhof;

b) Zamenhof en Grodno;

c) "Mi estas homo" (la ideologio de
L.L. Zamenhof). La aliaj prelegantoj
estos Francisko Degoul kaj Giorgio
Silfer.

Februare 27-28: Asembleo de la
Kooperativo de Literatura Foiro kaj
Seminario pri amaskomunikilaj
rilatoj, sub la gvido de Lu Wunsch-
Rolshoven el Berlino.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel
PF 178, 4005 Basel
Tel. : 0049 76 214 57 12.
Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la
malantaŭa domo, Riehenring 129.
esperantobasel@gmx.ch
pc : 40-33714-4
Jarkotizo unuopa : fr 25.-, paro : fr 30.-

Venontaj kunvenoj

Novembre 26: Programo 2010.
Decembre: Zamenhofa festo.
2010 Januare 10 : Prog. decidota.
Februare 23 : Karnavalo.
25 : Jarkunveno.
Marte 25 : Ludo /Scrabble.
Aprile 22 : Programo decidota.
Maje 27 : Programo decidota.

Junie 24 : Grün'80.
Julie 7 aŭ 14 : Programo decidota.
Aŭguste 29 : Ekskurso.
Septembre 23 : Paroli pri la ferioj.
Okobre 28 : Programo decidota.
Novembre 25 : Programo 2011.
Decembre : Zamenhofa festo.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Reinstalo de ŝildo pri Zamenhof

La Administra Konsilio de la Ĝeneva Urbo dissendis inviton al surstrata aperitivo dediĉota la 28an de aŭgusto al ceremonio dediĉita al pli konvena lokigo de la ŝildo pri L.L. Zamenhof ĉe la strato Vieux-Collège numero 12a. Estis bela manifestacio. La urbestro Rémy Pagani faris mallongan alparoladon. Li interalie menciis la Universalan Kongreson, kiu ĉi-jare okazis en Bjalistoko, kie naskiĝis L.L. Zamenhof antaŭ 150 jaroj. Mireille Grosjean, nome de SES, dankis la urbestron kaj la lokan grupon La Stelo kaj raportis pri sia plurmonata restado en Japanio kaj pri sia vojaĝo al Afriko. La lingvisto François Grin, profesoro en la Ĝeneva Universitato, vidas kelkajn allogajn ideojn, kiujn Zamenhof kaj ties lingvo Esperanto povus alporti sur la kampojn socian, politikan kaj eĉ

ekonomian: lernfacileco, imanenta flekseblo, egaliga efiko en komunikado, faktoroj, kiuj havus apartan gravecon en internacia urbo, kia estas Ĝenevo.

Post tiuj paroladoj Arlette Di Vetta kaj Mireille Grosjean, la prezidantoj de la ĝeneva kaj svisa esperanto-societoj, havis la honoron eltiri la ŝild-kaŝilon antaŭ publiko de kvindeko da ĉeestantoj, enkonduke al surstrata aperitivo.

Pri la reinstalo de la ŝildo

Fiksita kontraŭ granda ŝtona muro en 1934 ĉe la numero 12a de la strato Vieux-Collège, tiu ŝildo rememorigas la restadojn en Ĝenevo de L.L. Zamenhof revene el la 1-a Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer en 1905 kaj por partopreni la 2an Kongreson en Ĝenevo mem en 1906. Ĝi situas super ŝtuparo ebliganta atingi superan terason.

El tiu teraso falas hederroj, kiuj iom post iom kovris la muron kaj evidente ankaŭ la ŝildon mem. El la ŝtuparo esperantistoj provis eltondi la hederajn branĉojn por konservi videblon al la ŝildo. Sed instalo de ferbarilo neelsaltebla definitive malbligis tiun elhederigon de la ŝildo. Kaj acero komplikigis la situacion, ĝi ekkreskis sub la ŝildo kaj baldaŭ komplete kamuflis ĝin.

Unu tagon Armand Cotton eĉ konstatis, ke la ŝildo estis « tag »farbita. « *Estas vere tro da malbonaĵoj* » li opiniis, kaj li ekagis.

Konsente kun la komitato de la Stelo en 2005 li ekrilatis kun la urbaj instancoj, kiuj lin informis je la 1-a

de novembro, ke la ŝildon posedas la urbo, ke ĝi estas fiksita sur privata muro, sed ke la ŝtuparo troviĝas sur ŝtata parcelo. Tuj la urbo rapide agis, por ke la ŝildo estu purigita kaj ree videbla. En junio 2006 la acero estis eltranĉita. Armand Cotton kontentis pri la revideblo de la ŝildo.

Sed kompreneble hederaj branĉoj rekreskis kaj en 2008 plene rekovris la ŝildon. Tiam Armand Cotton opiniis, ke indus pli konvene loki ĝin. Li rekontaktis la saman urban oficon. Li intencis fiksigi la ŝildon al la muro de la larĝa Causambon-pasejo, kiu proksimas al la tre vizitata liceo Calvin aŭ, laŭ propono de Arlette Di Vetta, prezidanto de La Stelo, transloki ĝin aliloken sur la sama muro. Tiel la ŝildo restus ĉe la numero 12a de la strato Vieux-Collège, loko menciita en la esperanto-literaturo.

En februaro 2009 tiun lastan proponon adoptis la urba ofico pri la «komunuma bieno kaj pejzaĝoj». Por elekti pli konvenan mur-situpon surloka rendevuo estis proponita. La ĉefo de la publika laboro tiel renkontiĝis kun Armand Cotton kaj la komitatanoj de La Stelo, kaj dum tiu kunveno la urba reprezentanto esprimis la ideon pri inaŭgura ceremonio markanta la relokon de la ŝildo.

Armand Cotton tuj apogis tiun ideon ĉe la konvenaj urbaj instancoj argumentante, ke tiu inaŭguro estus honoriga por la esperantistoj. Kaj baldaŭ la Administra Konsilio de la Ĝeneva Urbo dissendis vastskalan inviton al tiu reloko de la ŝildo per tiuj ĉi vortoj: «*Le Conseil admi-*

nistratif de la Ville de Genève vous prie de lui faire plaisir d'assister à la réinstallation et la mise en valeur de la plaque L.L. Zamenhof ainsi qu'à la réception qui suivra. »

Jen vere bela maniero jubilei la 150-an naskiĝjaron de Zamenhof. Nun bone videbla ŝildo ree atentigas la pasantojn pri restadoj en Ĝenevo de la aŭtoro de la Lingvo Internacia.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

ccp 10-26785-8

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20.00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann
Tel. : 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :
Stéphanie Strappazon 079 415 33 16 ;
Sekretario : Francisko Randin 076 411 14
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88
86.

Venontaj kunvenoj

Novembre 2 : David Bühlmann parolos pri Pollando kaj Sonia Daubercies projekcios lumbildojn pri sia vojaĝo al la Universala Kongreso.

Decembre 12 (sabate) : Zamenhofa Festo.

2010 Januare 4 : Progr. decidota.

Februare 1 : Ĝenerala Asembleo.

Marte 1 : Programo decidota.

Aprile 5 : Programo decidota.

Maje 3 : Programo decidota.

Junie 19 (sabate) : Ekskurso.

Babilada rondo

Novembre 13 : Karlota invitas nin, Avenue Nestlé 9, 1800 Vevey. (079 393 32 63 kaj 021 922 34 74).

27 : Sonia invitas nin, Coin-d'en-Bas 5, 1092 Belmont sur Lausanne (021 728 26 51).

Decembre 4 : Francisko invitas por manĝi fonduon, Vallombreuse 14, 1004 Lausanne (076 411 14 55).

Tutmonda marŝado por paco kaj senperforto

Tiu evento komenciĝos en Lausanne (Chailly) sabate la 7an de novembro. Estos kunvenoj, prelegoj, diskutoj. Verŝajne Mireille Grosjean prelegos pri pcedukado. Ŝi estas en kontakto kun la organizantoj. Poste okazos la vera marŝo dimanĉe la 8an kaj lunde 9an en Ĝenevo. Informoj ĉe :

www.marchemondialepouurlapaix.ch

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Bären, Flecken 11, Rothenburg.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Novembre 4 (merkrede) ĉe Bellini : 14.00-16.00 : **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

Decembre 2 (merkrede) ĉe Rey : 14.00 : Zamenhofologio kaj pretigo de la programo 2010 kun Paul Scherer.

2010 Januare 6 (merkrede) ĉe Bellini : 14.00-16.00 : **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientisvislando)

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischerm Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Novembre 5 : *Kiel gasto en Benino, Koreo kaj Japanio (demandoj kaj respondoj) kun Mireille Grosjean. (Ĉekomence rakonta rondo.)*

Decembre 2 : Fonduovespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

1010 Januare 6 : Reĝa vespero kaj programado de la nova jaro.

Februare 3 : Per biciklo al Aŭstralio kun Benno Frauchiger.

Marte 3 : Ĝenerala jarkunveno. Ĉekomence rakonta rondo.

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum oficejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

**La kunvenoj okazas en
Centro "Karl des Grosse,
Kirchgasse 14, 8001 Zürich.**

Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser, Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20.30 (rekte apud la haltejo "Rössli-strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).

Radio elsendoj ĉe Radio-Lora

**Informoj pri la aktuala programo
de Esperanto-Societo Zuriko
troviĝas en la reto sub:**

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

[zuriko@esperanto.ch /](mailto:zuriko@esperanto.ch)

<http://esperanto.ch/zuriko>

Nova vivo en Zuriko

Ekde tiu-ĉi jaro nia grupo denove regule renkontiĝas monate dank'al la gastamo de Michael Roesser, ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en libera

amika rondo, kiu ebligas amikan babiladon kaj aplikadon de la lingvo.

Elektromagnetika somero

Vendredon la 17-an de julio nia klubo partoprenis eventon de Radio Lora farante dum la tuta posttagmezo ĝian programon. La preterpasantoj ĝuis la rapidkurson Csehmetodan de Didi Weidmann, kiu ankaŭ estis rekte elsendita de la radio. Liray kaj Sandra prezentis originalajn kanzonojn en Esperanto kaj en aliaj lingvoj, Martin Meyer klarigis kaj aŭdigis al la publiko sian panalotus-fluton kaj Dieter Rooke kaj lia filo deklamis poemojn.

Venontaj kunvenoj

Novembre 26 ĵaŭde 20.30 : Libera kunveno ĉe Michael Roesser.


Decembre 11 vendrede 19.00 : **Zamenhofa festo** kun aperitivo ofertita de la klubo en la baroka ĉambro de la **Centro Karl der Grosse**.

2010 Januare 29 ĵaŭde 20.30 : Libera kunveno ĉe Michael Roesser.

Februare 25 ĵaŭde 20.30 : **Ĝenerala kunveno** kaj poste amika rondo ĉe Michael Roesser.

Marte 25 ĵaŭde 20.30 Libera kunveno ĉe Michael Roesser.

-oOo-



Kongresen

Internacia Junulara Kongreso en Liberec, Ĉeĥio 18a - 25a de julio

Luc aŭ Luko Allemand

Trajno al Bazelo, buso ĝis la flughaveno. Duafoje en mia vivo mi flugos al Prago. Stranga sento, ĉar kiam mi estis tie la unuan fojon, tiam estis por studvojaĝo kaj mi tute ne imagis, ke reira okazo revenos. Kaj tamen jen nova okazo, sed ĉi-foje mi estas sola.

En Prago gastigantoj de *Pasporta-Servo* atendas min. Efektive mi decidis tranokti hodiaŭ en la ĉeĥia ĉefurbo. Do mi trafas buson, metroon, kaj ree buson, kies nomojn indikis al mi miaj gastigantoj.

Vespere je la 7-a horo mi troviĝas en la ŝtuparejo de ilia domo, antaŭ la pordo. Sed sola ; ili ne estas hejme. Fakte mi ne diris je la kioma horo mi alvenos, do mi ne timu ; ili verŝajne simple ne ankoraŭ revenis el ...

Mi sidiĝas sur ŝtupo kaj atendas. Enuas, stariĝas, iras al fenestro. La apuda domo havas originalan lifton. Ĝi estas parte el vitro, ekster la domo, gluita kontraŭ ĉi-lastaj, same kiel hedero ĉe muro.

Ili ne alvenas, mi residiĝas kaj prenas el mia dorsosako novelon de Julio Baghy titolitan *Kiel Miloch instruis angle*. Mi lacas.

Tiam mi aŭdas ion sube : iu grimpas la ŝtuparon. Du personoj, kiuj parolas en esperanto ! Kaj ho, surprizo ; iun el ili mi jam konas. Estas Sylvie, kiun mi ekkonis lastjare dum la UK. La alia estas nia gastigantino, Vlasta.

Tuj energio revenas ! Triope ni havas tre bon-etosan vesperon ĝis meznokte. La morgaŭon tamen ni leviĝos frue por iri kune al Liberec, la kongresa urbo.

Studenta hejmo : la kongresejo. Mi retrovas Marek kaj Paŭlinka, geamikojn ekkonitaj lastjare. Estas ĝojo revidi ilin. Dum la posttagmezo konstante alvenas homoj. Kelkajn mi jam konas, multajn mi ekkonas aŭ ekkonos dum la semajno, interalie ĉarmajn knabinojn.

Nu, mi ne rakontu la tutan kongreson, estas tiom multe, multe da interesaj aktivecoj, renkontoj, impresoj... Ni havas danco-kursojn. Mi partoprenas ilin

ĉiujn; mi tiom ŝatas tion : mez-epokajn dancojn, tradiciajn dancojn el Francio, sud-amerikajn dancojn, rusajn dancojn, kaj la faman ĉeĥan dancon la *Polka*.

Iun vesperon Kimo koncertas sur la tegmento. Mirinda etoso. Steloj brilas en la ĉielo kaj sube ni ĉiuj, esperantistoj, geamikoj, gefratoj el diversaj landoj, ni ĝuas la Vivon dancante kune, kantante kaj aŭskultante parolojn ne sensencajn. Poste, je la 2-a horo matene, en la « gufujo » trikante teon trankvile kaj babilante kun Kimo mi aĉetas lian CD-n.

Merkrede posttagmeze okazas en la urbocentro de Liberec *interkulturlingva* festivalo. Ĉiu lando havas sian budon. Ne-esperantistoj el la urbo ankaŭ venas, interesiĝas. Kun plezuro kaj kun tri samlandanoj mi prezentas Svislandon. Estas ankaŭ tre interese viziti la aliajn budojn, gustumi naciajn specialaĵojn.

Kaj la semajno forpasas, tro rapide ! En la buso revenante al Prago mi ploras. Ni ĉiuj brakumis ĉi-matene esperante nin revidi venont-jare en Kubo. Mi ploras pro tristo, ke la kongreso jam finiĝis, sed ankaŭ pro ĝojo, ke tiaj renkontoj eblas kaj okazas.

-oOo-

94a Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando

25a de julio -01a de aŭgusto

Perfekta kaj mirinda UK

Mireille aŭ Mirejo Grosjean

Belegaj lokoj, bonega organizado, ĉio iris glate dum tiu UK. Estis eĉ retkafejo je dispono, tio estas novaĵo. La bjalistoka solvo por havi grandegan salonon estis bona : grandega tendo kun ligna planko kaj multaj seĝoj. Neniam ĝi estis plena, do ĝi estis sufiĉe granda. Partoprenis 1'800 homoj el 60 landoj.

Laŭ mia scio dudek svisoj partoprenis ĝin.

Svisoj vigle partoprenis en diversaj kampoj.

Unue : Edukado

Estis subkomitatkunsido pri tiu temo. Oni petis al mi gvidi ĝin. Tion mi faris.

La komitato de UEA same kiel tiu de ILEI elektis novan Internacian Ekzamenan Komisionon (IEK). En ĝi restas Monika Molnar kaj mi kiel prezidanto.

Monika Molnar partoprenis kiel asistanto de Katalin Kovats en la paroligaj rondoj kaj metiejoj de edukado.net. Plie ŝi ekzamenis laŭ la nova ekzamen-sistemo. Ŝi laboregis kaj dum iuj tagoj ŝi eĉ ne trovis tempon manĝi.

Mi ricevis mian atestilon pri sukceso en la novtipaj ekzamenoj KER-ITK de UEA en la nivelo C1. Mi ricevis lertigadon por esti ekzamenanto en tiu nova sistemo kaj tuj ekdeĵoris pro la granda nombro da kandidatoj : 47. Inter ili tri svisoj.

Ni metu ILEI-n en tiun ĉi ĉapitron. Ĝi havas nun novan estraron, ĉar 2009 estis elektojaro. Stefan MacGill estas la prezidanto kaj Duncan Charters la vicprezidanto. Dum la kunsido de ILEI mi povis substreki la grandan valoron de la ILEI-konferenco en Benino en 2008, kiun mi partoprenis. Mi menciis la verkadon de tiea skipo : ili inventis rakonton, kiu celas instrui al virinoj la uzon de certaj plantoj riĉaj je iuj vitaminoj. La partoprenintoj plie desegnis bildstrion de tiu rakonto kaj la verko estis transdonita al UNESCO. Tio estas grava kaj utila laboro per Esperanto. Pri nia kunlaboro kun UNESCO mi povas diri, ke mi dum UK povis renkonti la deĵorantojn ĉe tiu instanco : Renée Triolle, François Lo Jacomo kaj Barbara Despineys. Ni parenteze notu, ke UNESCO havas filion en Ĝenevo : le *Bureau International de l'Education*.

Mi faris oficialan proponon, ke ILEI okazigu regule sian konferencon en Afriko ekzemple ĉiun trian jaron. Mi ricevis fortan subtenon. Rimarkindas, ke neniuj afrikano ricevis vizon al Pollando... Do ni devas iri al ili. Ĉar ni plantis arbon en la Centro Songhai en Porto Novo, ni devas denove iri tien por konstati, ĉu ĝi bone kreskas. Rilate al tio du personoj anoncis al mi sian intencon subteni finance la partoprenon de afrikanoj al tia konferenco en Benino, precize por ses personoj ; mi nun estas iu peranto inter sponsoroj kaj organizantoj. Ĉar mi konas persone la homojn, mi povas fari proponojn. La sponsoroj petis tion de mi.

Dum la vintro mi elpensis novan ekzamensistemon por blinduloj. Mi submetis ĝin al finnaj blinduloj kaj al aliaj fakuloj pri tiu temo. Ambaŭ komitatoj, UEA kaj ILEI, aprobis ĝin. Tio estas signifoplena paŝo, kiam oni scias, ke Louis Braille naskiĝis en 1809, do antaŭ 200 jaroj. Mi proponis la unuan sesion en UK 2011 en Kopenhago. Bonvolu transdoni tiun informon al Sinjoro Martin Meyer en Zuriko.

La sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI-UEA estis nuligita, ĉar kompreneble la kandidatoj preferis ekzameniĝi laŭ la nova sistemo, kiu garantias ŝtatan agnoskon.

Due : Laboro de la svisa delegacio de UEA ĉe UN en Ĝenevo

En kunlaboro kun Humphrey Tonkin, Kimura Goro kaj Renato Corsetti, mi povis trifoje klarigi mian agadon en Ĝenevo. Mi klare montris, ke emeritoj povas fari tian taskon senprobleme, sed ke sendependa persono deĵoranta por UEA iel perdas la okazon gajni monon. La delegitaro laboras volontule. Ĉar Ĝenevo gastigas la ĉefan eŭropan sidejon de UN, estas tasko de Svisa Esperanto Societo trovi taŭgan teamon por tiu deĵorado. Nuntempe la ĉefdelegito estas Stefano Keller kaj la aliaj personoj estas Cesco Reale, Charmian Common kaj mi. En septembro kaj en novembro jam legiĝas en mia agendo dufoje tri tagoj en Ĝenevo. La gvidantoj de UEA plurfoje kaj vigle laŭdis la elstaran laboron de la ĝeneva stabo. Mi povis konatiĝi kaj interŝanĝi informojn kun la deĵoranto en Novjorko en la ĉefa sidejo de UN.

Trie : Laboro de komitatano A

Ekde 1998 mi estas komitatano A nome de Svislando laŭ decido de la estraro de SES. Konsekvence mi partoprenis en du plenkunsidoj de tiu komitato, dufoje

kvar horojn. Plie estas subkomitat-kunsidoj, ok entute. Mi neniam povas partopreni en ĉiuj, do mi elektas tion, kio plej gravas. Mi partoprenis en la kunsido de la subkomitato « Eksteraj rilatoj » kaj en la subkomitato « Edukado ». Alia tasko de la komitatano A estas saluti la kongresanojn dum la solena inaŭguro aŭ trovi iun taŭgan personon por fari tiun signifoplenan eldiron. En Bjalistoko feliĉe mi sciis antaŭe, ke ĉiu salutanto devos diri la vorton PACO en la lingvo de sia lando. Feliĉe mi povis en mia hejmo atingi mian vortaron Rumantsch-Deutsch kaj trovi la vorton PACO en la romanĉa : *pasch*. Tiel mi povis diri tiun vorton en niaj kvar oficialaj lingvoj. Mi rimarkis, ke reprezentanto de Israelo salutis dirante « *ŝalom* » en la hebrea kaj « *salam* » en la araba. Alia tasko aŭ plezuro por la komitatanoj estas invito ĉe la urbestro. Mi partoprenis tiun kunvenon en la kastelo Branicki, kie ni vidis belegan dignan dancon kun brilaj kostumoj kaj ricevis bongustegan vespermanĝon.

Kvare : Anonco pri ALVOKO AL MONDPACO

Mi petis al Osmo Buller, ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo, la rajton prezenti tiun agadon dum la malfermo. Mi komencis ellabori tiun agadon dum mia restado en Japanio en kunlaboro kun japanaj pacbatalantoj. Tuj Osmo diris ne, ĉar tiu solenaĵo ofte daŭras pli ol du horoj. Tamen li proponis, ke mi faru tion dum la fermo. Dum la fermo sidis apud mi Osioka Taeko san, mia japana fratino el Hiroshima. Ni duope manenmane supreniris al la scenejo, jam ekis aplaŭdoj. Oni donis al mi du minutojn, do mi devis resumi kaj ripeti la nomon de la retejo : www.alvoko-al-mondpaco.org.

La retejo jam funkcias en la franca, en la germana kaj en Esperanto. Vi povas viziti ĝin, legi, pripensi kaj subteni klakante. Mi anoncos la agadon vastskale, kiam la japana kaj la angla lingvoj pretos. Mi rapide prezentis la agadon de Taeko san : rikolto de pacmesaĝoj per Esperanto okaze de la virina tago la okan de marto. Multaj homoj venis poste al ni por saluti ŝin kaj gratuli ŝin.

Kvine : Eŭropa Agado

Estrarano Hori Yasuo, kiu respondecas pri landa agado, kunvenigis personojn por paroli pri agado en Eŭropo. Li petis al mi gvidi la kunvenon. Li partoprenis, same kiel Sean O Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

Unue mi atentigis la aŭskultantojn pri la danĝero en la uzo de la vorto « regiono » kaj « regiona ». Povas esti enlanda disdivido, ekzemple Romandio, Alemano, Tiĉino estas regionoj en Svislando. En la kutima paroluzo de UN regiono estas kontinento, do ŝtataro.

Fakte per rimarko de mi antaŭ kelkaj monatoj leviĝis la demando, kial ne ekzistas Eŭropa Komisiono de UEA, kiel ekzistas Afrika Komisiono (AK), Amerika Komisiono kaj Azia Komisiono (KAEM). Kiel mi faris en Roterdamo en 2008 en la kunveno de Azia Komisiono, mi unue prezentis la geografian aspekton de tio, tio estas, kie Azio komenciĝas, kie Eŭropo finiĝas. Ĉiuj scias, ke Uralo estas la limo inter la du kontinentoj. Multaj scias, ke same kiel Rusio Turkio havas azian parton kaj eŭropan parton. Istanbulo estas la nura urbo en la mondo, kiu situas sur du kontinentoj. Malmultaj konsciiĝas pri la kaŭkaza

regiono, kie situas tri ŝtatoj : Kartvelio (Géorgie, Gruzinskaya), Azerbejĝano kaj Armenio. Dum kunveno de KAEM en 2008 mi prezentis tion kaj tuj armena virino stariĝis kaj konfirmis vigle : ni estas en Azio, ni havas komunajn renkontiĝojn kun gesamideanoj el Irano ! Paralele la tri kaŭkazaj landoj estas membroj de Konsilio de Eŭropo (KE). Do laŭ mi oni bone povas pensi, ke tiuj tri landoj apartenas kaj al Eŭropo kaj al Azio. Post tiu prezento mia ekparolis virino doktoro pri internacia juro el Hispanio, se mi bone memoras ; ŝi tute konfirmis kaj aldonis, ke ne ekzistas en la leĝaj dokumentoj de Konsilio de Eŭropo iu klara indiko pri limoj de Eŭropo.

En Eŭropo agadas EEU por Esperanto tre vigle, ĉefe en Bruselo por lobiado. EEU grupigas la landajn asociojn de la EU landoj, tio estas 27 ŝtatoj. EEU ne havas laŭ sia statuto iun rilaton al UEA.

Kio ekzistas en Eŭropo ekster tiu grupo ? Ekzistas 20 aliaj ŝtatoj, inter ili Svislando.

La disaj landoj : Islando, Norvegio, Svislando, Liĥtenŝtejno.

La orientaj landoj : Belorusio, Ukrainio, Rusio, Moldavio.

La balkanaj landoj : Serbio, Kroatio, Bosnio, Makedonio, Albanio.

La kaŭkazaj landoj : Azerbejĝano, Armenio, Kartvelio.

La etaj landoj : Andoro, Vatikano, San Marino, Monako.

Dum la kunveno mi esprimis min jene : Unue : mi ne bone komprenus formigon de grupo, landaro, komisiono el tiuj 20 disaj landoj. Due : ni svisoj kunlaboras kun la najbaraj landaj asocioj por interŝanĝi varbideojn ; por tio ni ne bezonas iun plian komisionon. Ileana Schroeder el Danlando anoncis, ke ekzistas ene de EEU subgrupoj regionaj, kiuj entenas ne EU-landojn.

Estis rekomendo, ke ni klopodu uzi Esperanton en la programo de ĝemelaj urboj.

Estis rekomendo, ke ni observu kelkajn interesajn instruprogramojn.

Ne estis iu decido pri kreo de iu nova grupo.

Do ni daŭre klopodu rilati kun niaj najbaroj, ĉefe kun tiuj, kiuj uzas niajn naciajn lingvojn.

Sese : diversaĵoj

La Poloj mem antaŭorganizis la Internacian Artan Vesperon, parte kun usoneca muziko kaj danco... dubinda afero... Tiu kutima tasko mia falis de miaj ŝultroj.

Dum la Movada Foiro estis loko por SES kun ŝildo. Estis neniu materialo. Mi notis sur la ŝildo, ke mi estas je dispono por informi iun. Dum la tuta kongreso mi havis la okazon raporti pri Esperanto en Svislando kun multaj personoj, kiuj demandis al mi pri tiu temo.

2010 estos elektojaro por la estraro kaj la komitato de UEA. Membroj de la elekta komisiono ekparolis al mi... Mi pripensas.... Aŭdu, ke plurfoje en Japanio oni sugestis al mi fariĝi la unua prezidantino de UEA... Ĉar Probal Dasgupta certe rekandidatiĝos, mi ne havas tiun intencon. Iu diris al mi : ĉar Claude Piron mortis, vi certe nuntempe estas la plej fama sviso en la Esperanto-

movado. En Japanio post mia prelego pri konflikto-solvado mi aŭdis : vi estas la nova Pestalozzi ! Ĉar mi tre malŝatas memlaŭdojn ĉe aliaj personoj, mi tuj ĉesu !

Mia verketo « Afrikanoj kaj mi » estis aĉetebla en la Libroservo. 100 ekzempleroj vendiĝis... Mi nun verkas „Japanoj kaj mi“. Ĉu ĝi pretos por la UK 2010?

Kiel konsilanto de la Afrika Komisiono de UEA mi foje deĵoris en la budo de tiu komisiono kun Jean Codjo, beninano loĝanta en Moncton, Kanado. Aliaj afrikanoj estis du, kiuj studas nuntempe en Pollando : unu el Kongolando loĝanta en Sudafriko kaj unu el Tanzanio.

En Herzberg en junio mi mendis 50 T-ĉemizojn nigrajn kun teksto „Esperanto, nia lingvo“ kaj „Lingvo de la paco“ en dek lingvoj. La liverado okazis en Bjalistoko. Mi vendos ilin en CDELI, kiam mi iros tien. Mi pretas sendi iujn tra Svislando kun fakturo. Mi havas malsamajn grandecojn. La prezo estas po 10 CHF. Oni povas libere aldoni ion por mia agado en Afriko.

Ne forgesu viziti mian blogon „mirejo3.blogspot.com“.

-oOo-

Renkontiĝo de Esperantlingvaj Familioj = REF



Sur tiu foto, se vi bone rigardas, vi malkovros Romain kaj Samuel Bélisle. Fakte ĉiusomere, ekde sia bebaĝo, ili ĉeestas kun la patrino aŭ la patro aŭ eĉ kun ambaŭ la REFon. Pasintsomere ĝi okazis en Serbio.



Kion oni faras en REF? - Kiel montras tiu ĉi bildo, oni ludas kantante, ekzemple la rondon de la dormanta urso. Atentu! ĉar centre dormas danĝera urso! Kiam ĝi vekigōs kun siaj idoj, tiam tuj forkuru por ne esti manĝita!




Se vi ŝatas manlabori, tiam venu fari florojn por dekoracii la manĝotablon.



Aŭ eblas pretigi panon laŭ serba recepto, volvante paston ĉirkaŭ stangon por baki ĝin en forno

varmega. Por bongustigi la kukajōn, oni trempas ĝin en oleon kaj sukeron. Bonan apetiton!



En REF nenio perdiĝas. Per la mal-plenaj plastaj boteloj oni konstruas longan tubon, kunfiksante ilin per glu-papero kaj per interna ŝnuro. Bone videblas Samuel kaj Romain, kiuj fariĝis lertaj tubkonstruistoj!



Jen la tubo longiĝas laŭ la barilo de la ŝtuparo, kaj la ludantoj kuras supren kun globeto, por ĝin ruligi en la botel-tunelon. Subkaskede oni rekonas Romain, kiu ŝatas tiun ludon. Sed li de tempo al tempo interrompas ĝin por iri ludi en ŝak-turniron. Ĉiu vice provas venki la ĉampionon centre starantan per propra ŝak-luda aranĝo. Sed anstataŭ longe atendi sian vican revenon, oni havas liberan momenteton por iri ruligi sian kuglon en la botelan tubon. Vere ekscitaj aktivecoj!



Jen ni vidas la atentajn ŝakludantojn, kiuj vice provas venki la hungaran ŝak-majstron!

Kaj je la dispono de la muzikemuloj troviĝas diversaj instrumentoj, eĉ piano en klasejo de la renkontiĝa lernejo.

Tiel orkestro kaj koruso povas pretigi belan koncerton.



Jen sin prezentas la grupo de muzikistoj.



Posttagmeze agrablas sin bani.




Ŝipeto grupigas la plongemulojn.



Samuel kaj Romain pretas por viziti abelujojn.



Interesa malkovro de la abela aktiveco kun abelisto.



Samuel fiere montras sian blok-turon!

Kunlaboro kun AGROSCOPE en Changins-Wädenswil

Mireille Grosjean

AGROSCOPE estas federa oficejo, do laborejo gvidata de la Konfederacio. Ekzistas du oficejoj, unu en Changins en la kantono Vaŭdo kaj alia en Wädenswil en la kantono Zuriko.

En junio kunlaboranto de Agroscope ekrilatis kun la SES estraro, petante tradukon de informilo pri la danĝera planto Ambrosio. Mi tuj respondis, ke mi povos traduki tion en aŭgusto. Ili konsentis. Mi faris tion. Poste aperis papera dokumento en Esperanto pri tiu planto kun multaj fotoj kaj ankaŭ la dokumento aperas sur la retejo de Agroscope.

Temas pri planto, kiu venas el Ameriko kaj nun etendiĝas al la tuta mondo. Ĝi kaŭzas spirproblemojn. Oni devas elŝiri la plantojn, protektante sin per gantoj kaj per masko kaj poste bruligi ĝin.

Sed mi faris plian paŝon : mi proponis al tiu kunlaboranto, ke mi klopodos ricevi tradukojn en aliajn lingvojn. Tion mi sukcesis : mi povis liveri al Agroscope tekstojn en la rusa, en la ukraina kaj en la vjetnama.

Tio estas tre efika laboro per Esperanto utila kaj pozitiva.

Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.


Akvon por ĉiuj !

« Akvon por ĉiuj ! » estas la devizo de ekspozicio organizita de Helvetas. La projektoj de tiu svisa asocio politike kaj konfesia sendependa realigitaj en pluraj landoj de la sudo (Azio, Afriko, Sudameriko ktp.) celas plibonigon de la vivkondiĉoj en kamparaj medioj. La ekspozicio prezentiĝas kvazaŭ mondovojaĝo al tiuj lokoj, kie la asocio koncentras siajn fortojn en la sektoroj de la infra-

strukturoj (provizado de akvo, drenado, konstruo de pontoj, stratoj kaj komunumaj konstruaĵoj) por daŭripova mastrumado de naturaj resursoj.

Pli ĝenerale Helvetas prezentas postulojn al la socio koncerne akvon, tiu vivoforto kiu rariĝas :

– Akvo estas homrajto : UN devus deklari la aliron al trinkakvo homrajto pere de konvencio pri la akvo.





– Certigi la bazan disponigon kaj eviti malŝparon : la registaroj devus disponigi al siaj loĝantoj por digna vivo sufiĉan kvanton da pura akvo, t. e. po 50 litroj tage kaj persone je ne tro alta prezo. Por pli ol 50 litroj la uzantoj devus pagi la prezon kiu kovras la kostojn por eviti malŝparon kaŭze de akvo tro malmultekosta.


– Akvo apartenas al ĉiuj: akvo estas socia kaj kultura posedaĵo publika kaj ne devas esti fonto de profito.

– Akvo bezonas demokration. Por ke politiko justa kaj daŭre efika povu esti gvidata, devige la utiligantoj povu esti konsultataj pri orientado de tiu politiko.

Minimume unu triono de la loĝantaro en evolulandoj ne havas aliron al pura trinkakvo. La malbona provizado per akvo estas grandega risko por la sano. Ĉiuj 15 sekundoj mortas infano pro la sekvo de diareo.

Akvodesinfekta sistemo

La Federacia Instituto pri akvoprovizado, akvopurigado kaj akvoprotektado (EAWAG) en Svisio evoluigis tre simplan, sed efikan metodon de akvodesinfekto per la suno (SODIS), kapabla efike plibonigi la mikrobiologian kvaliton de trinkakvo: necesas simple plasta botelo. Oni plenigas ĝin per la akvo infektita de mikroboj, fermas ĝin kaj metas ĝin ses horojn en la sunon. La ultraviolaj ondoj kaj la suna varmego mortigas la ĝermojn en la akvo kaj igas ĝin trinkebla. Helvetas disvastigas ĉi tiun metodon en Vjetnamio, Butano, Srilanko kaj Filipinoj dank' al financa helpo de Migros.



Akvumado per guto-post-guto

La nutraĵa sekureco kaj la stimulado de biologia agrikulturo apartenas al la prioritataj programoj de Helvetas en Etiopio, kiu projektas efikan strategion kontraŭ la malsato per la akvumado guto-post-guto. Etiopio ne estas tute dezerta, ekzistas multaj riveroj, kiuj trafluas la altebenojn kaj enfluas en la Bluan Nilon, sed

en la nordo de la lando la pluvoj estas tro malfortaj por garantii sufiĉan produktadon de nutraĵoj. La problemo akriĝis dum la lastaj jaroj pro erozio sekve de senarbigo de multaj arbaroj. Ĉi tiuj regionoj estas ofte viktimoj de sekecoj kaj malsatoj. La akvumado per guto-post-guto ebligas al la kamparanoj la pligrandigon de iliaj rikoltoj. Kontraŭe al aliaj konvenciaj sistemoj, ili havas nur malfortan influon negativan sur la ĉirkaŭmedion.

Aliaj projektoj

En Mozambiko Helvetas helpas por instalado de putoj. Tio ebligas interesiĝon de la homoj pri la higiena situacio, ekzemple pri la rilato inter akvo kaj difinitaj malsanoj. La simpla ago lavi al si la manojn povas eviti infektojn.

En Nepalo oni klopodas plibonigi la higienan situacion kaj samtempe krei laborpostenojn per konstruado de latrinoj. Fakuloj por tiuj konstrulaboroj estas formitaj kaj poste iras de vilaĝo al vilaĝo por konstrui latrinojn kaj doni konsilojn pri mastrumado de akvo.

Helvetas ankaŭ subtenas la kamparanojn kultivantaj kotonon en Malio, Burkina Faso kaj Kirgizio instiganta ilin al biologia kultivado per komposto, fitosanitaraj produktoj kaj ne plu uzi insekticidojn kaj kemiajn sterkojn, kiuj infiltrigas en la teron kun la akvo grandkvante bezonata por la kotonkultivado.

En Gvatemalio la asocio helpas por la akvomastrumado per financa subteno kaj teknika helpo al malriĉaj komunumoj. (rs)

Historia vizito de rusa prezidento en Svisio

Ĝis nun neniam, nek dum la tempo de la caroj nek dum la sovetia periodo, rusa ŝtatestro estis oficiale akceptita en la Federacia palaco en Berno. La vizito de Dmitri Medvedev estas signo de ambaŭflanka varmiĝo de interrilatoj.

La svisa diplomatio reprezentas la interesojn de Rusio en Kartvelio kaj reciproke tiujn de Kartvelio en Rusio post la konflikto en 2008 en Osetio. Ĝus publikiĝis pli ol milpaĝa raporto pri la kaŭzoj de tiu milito mendita de EU fare de

tridek fakuloj sub la gvido de svisa diplomato Heidi Tagliavini. Kiel neŭtrala kaj sendependa ŝtato Svisio ludis aktivan rolon jam antaŭe dum la malvarma milito en la Organizo por Sekureco kaj Kooperado en Eŭropo (OSKE) kaj estus en bona pozicio por arbitri inter Rusio kaj NATO. La rilatoj estis streĉitaj kun Rusio dum la lastaj jaroj, ĉar Svisio rapide rekonis la sendependiĝon de Kosovo. Kaj malfeliĉe okazis grava aviadila akcidento super la Konstanca lago, kie pereis multaj rusaj

infanoj kaj svisa aviadilgvida kompanio estis implikita. Inter-tempe la monda ekonomia krizo trafis ankaŭ Rusion.

Simbolaj gestoj

Dmitri Medvedev alvenis lunde, la 21an de septembro 2009, en Berno, kie li restis du tagojn. Li kaj lia edzino Svetlana jam antaŭe sendis du ursidojn, Maŝa kaj Miŝa, kiel donacon por la urso foso en la svisa ĉefurbo. Urso estas la blazona besto de la kantono kaj urbo Berno. Marde li vizitis en centra Svisio la memorigan monumenton pri generalo Suvorov kaj liaj trupoj, kiuj ekzakte antaŭ 210 jaroj transpasis tie la Alpoj kun 21 000 soldatoj kaj trovis fortan kontraŭstaron de la Napoleona armeo. Memore al la mortintoj Medvedev metis florkronon. [1]

Sed kompreneble li venis ĉefe por pridiskuti aferojn koncernantajn ambaŭ ŝtatojn: akordo por pli facile akireblaj vizoj, alia por helpo kaze de katastrofoj, financaj kaj ekonomiaj demandoj, sekureca politiko en Eŭropo (Rusio kaj Svisio ambaŭ ne membras en EU kaj NATO, sed estas reprezentataj en la Konsilio de Eŭropo), la engaĝiĝo de Svisio dum la Olimpiaj ludoj en Soĉi ktp. Oni ankaŭ priparolis la situacion pri homrajtoj kaj esprimlibero en Rusio, sed ŝajnas ke la oficialuloj (diplomate ne volis insisti pri tiu flanko. Kontraŭe, Amnestio Internacia, la Societo por la Minacataj Popoloj kaj Reporteraj Senlimaj memorigis la mortigon de Natalia Este-

mirova en Ĉeĉenio en julio ĉi-jare kaj antaŭ tri jaroj de la ĵurnalisto Anna Politovskaja.

Sekurecaj preparoj

La sekurecaj preparoj estis senprecedencaj kaj okupis multajn policistojn kaj armeanojn. Oni volis eviti similan incidenton kiel tiun okazintan dum vizito de la ĉina prezidento Hu Jintao komence de la jaro. Malgraŭ severaj kontroloj, tibetaj rifuĝintoj sukcesis alkroĉi bendon sur la tegmento de domo ĉe la federacia placo kun surskribo por sendependiĝo de Tibeto. Pro tio la ĉina prezidento tre koleris. La vizito de Medvedev okazis do preskaŭ sen kontakto kun la ekstera publiko.

Iuj komparis la oficialan viziton de la rusa prezidento en Svisio al renkonto de Goljato ĉe Davido. Ĉiukaze oni interŝanĝis ĝentilaĵojn kaj la svisa prezidento Hans-Rudolf Merz povis apliki siajn sciojn de la rusa lingvo. Li substreki la grandecon de Rusio kaj insistis pri la nepra neceso de bonaj interrilatoj. En antaŭaj jarcentoj svisaj arkitektoj, fromaĝistoj kaj sukeraĵistoj senprobleme migris al Peterburgo aŭ al Moskvo kaj tie laboris. Dmitri Medvedev respondis ke iam manlaboristoj vojaĝis inter la du landoj kaj hodiaŭ tion faras komercistoj kaj entreprenistoj.

Ekonomiaj rilatoj

La rusa prezidento venis kun grupo da entreprenistoj kiuj renkontis svisajn samrangulojn. Oni

vidis tie ekzemple la svisajn entreprenistojn Nicolas Hajek (Swatch, Smart) aŭ Peter Spuler (Stadler Rail). Ankaŭ rusaj milionuloj kaj miliarduloj investas en Svisio – ekzemple la oligarĥo Viktor Vekselberg (Renova, CO Oerlikon) –, dum 600 entreprenoj en Rusio vivas de svisa kapitalo. Tamen svisaj entreprenistoj hezitas fondi entreprenojn en Rusio ĉar ili timas burokrataĵojn kaj korupton. Medvedev interesiĝus pri kontrakto de libera komerco inter ambaŭ landoj kaj laŭdis Svision kiel unu el la plej stabilaj kaj gravaj partneroj de Rusio kaj kiel monde konata financa platformo. Li opiniis ke svisaj reprezentantoj devus esti invitotaj al la konferencoj de G-20 pri la financa reguligo.

Medvedev montris komprenemon pri la svisa banksekreto kaj nomis ĝin baza rajto: «La ŝtato rajtas enspezi la impostojn de siaj civitanoj, sed iliaj bazaj rajtoj same devas esti garantiataj.» La svisa prezidento estis kontenta aŭdi tion, ĉar Svisio ĝis nun estis kritikata de la Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo pro tio ke ĝi ne aŭtomate informas pri eventualaj impostfraŭdantoj kun bankkontoj en Svisio. Intertempe oni reagis al tiuj kritikoj plenuminte la postulojn de ĉi tiu organizo pri impostkontraktoj kun dekdu ŝtatoj kaj Svisio ne plu aperos sur la « griza listo ».

Medvedev en la gazetaro

Kelkfoje karikaturoj en la gazetoj diras pli ol multaj vortoj.

Ĝenerale oni perceptas Medvedev-on homo dependanta de Putin. Ekzemple en unu desegno pentristo faras portreton de Medvedev. Malantaŭ li estas alkroĉita bildo de Putin, kaj oni vidas ke la pentristo desegnas la trajtojn de Putin, vidu interrete :

<http://www.globecartoon.com/dessin> (alklaku: Medvedev, président russe).

Noto

[1] Aleksandro Suvorov, en septembro 1799, post venkoj sude de la Alpoj en Italio kontraŭ la Napoleona armeo, ja povis konkeri la Gothardon, sed alfrontis la kontraŭulon norde en la abismo Schöllenen (proksime de Andermatt) sur la « ponto de la diablo », kie nun troviĝas la memoriga monumento.

Tie kaj en aliaj lokoj la rusa armeo perdis multajn homojn, ĉevalojn kaj kanonojn, ĉar la valoj estis blokita de la francoj kaj la rusoj devis serpentume trapasi plurajn altajn pasejojn neĝkovritajn antaŭ ol kuniĝi kun la trupoj de la generalo Korsakov ĉe la Konstanca lago kaj ambaŭ armeoj rehejmiĝis.

La perdoj estis teruraj, de komence 21 000 soldatoj restis al Suvorov nur 15 000 homoj.

Svisio dum la revolucia periodo estis scenejo de tiuj alfrontoj kaj suferis pro la rekvizicio de bestoj, nutraĵoj kaj pro detruoj de tutaj vilaĝoj, kio kaŭzis en la jaro 1800 mizeron kaj malsaton ĉefe de kamparanoj. (rs)

Etiko en ekonomio – scienco marĝena ... kaj kelkfoje ĝena

La Altlernejo pri Ekonomiko (HSG) en St.Gallen estas ankaŭ internacie konata kiel « forĝejo de kadruloj » kaj zorgema pri sia reputacio. En la lastaj monatoj ĝi tamen estis scenejo de internaj konfliktoj kaj kritikoj de politikistoj el la ekstero.

Kio okazis? Ulrich Thielemann, vicdirektoro de la HSG-Instituto pri etiko en ekonomio, deklaris antaŭ financa komisiono de la germana federacia parlamento rilate la svisan banksekretion ke « mankas al la dominaj politikaj fortoj en Svisio ĉiu konscio pri maljusto koncerne la rifuzon de interŝanĝo de informoj rilate la svisajn bankkontojn de eksterlandanoj ». Sekve al tio iuj kolegoj profesoroj denunciis lin kiel « nestmalpuriganton* » kaj la universitata rektoro kaj la eduka hierarkio admonis lin. Thielemann defendis sin argumentante ke li uzis sian opiniliberecon de scienca esploristo kaj estas promese ligita al la vero.

Per tio ankaŭ pli vasta publiko eksciis ke en la universitato pri ekonomio ekzistas katedro pri etiko en ekonomio (la sola en Svisio), kies direktoro, Peter Ulrich, ĵus emeritiĝis post dudekjara lekcio. Estis okazo por televida intervjuo unuhora. Ne preterpasbla demando estis, ĉu lia laboro esplora kaj instrua montriĝis utila

kaj estis bone konsiderata. La intervjuito trankvile kaj metode respondis la demandojn de la ĵurnalisto. Ulrich konstatis ke nur triono de siaj kolegoj en la altlernejo havas komprenon pri tiu marĝena scienco, la sciencistoj pri juro pli ofte ol tiuj pri ekonomiko. Same eble triono de la studentoj elektas ĉi tiun fakon, ĉu pro libera decido kaj propraj interesoj, ĉu pro la fakto ke ili devas « kolekti poentojn » en la prihomaj kaj sociaj sciencoj, fakoj devigaj je 25 procentoj apud la ekonomiko.

Mi ne pretendas kompetente resumi la demonstrojn de profesoro Ulrich, mi nur supraĵe skizas kelkajn ideojn. Laŭ li, se oni analizas objekte ekonomion kaj socion, oni konstato ke la ekonomia liberalismo (kapitalismo) kaj la komunismo (planekonomio) havas ambaŭ fiksajn antaŭkonvinkojn pri ekonomio:

– aŭ la miton ke la merkato memreguligas sin;

– aŭ la miton ke en ekonomio ĉio estas planebla, se oni nur aplikas la ĝustan sistemon.

Ambaŭ mitoj konsistigas kvaŭzaŭreligiajn konvinkojn. La batalo inter kapitalismo kaj komunismo fakte similas al religia milito.

Efektive ekonomio estas multe pli komplika kaj la ekonomia etiko havas longan historion en filozofio. Ekzemple jam Aristotelo okupiĝis pri ĝi, sed por li ekono-

mio kaj etiko ne estis antagonismaj. Ekonomia profito estas pravigebla nur se ĝi ankaŭ profitas al la socio. Responsa civitano devas zorgi ne nur pri sia individua prospero, sed ankaŭ aktive partopreni en la socia kaj politika vivo. Por la hodiaŭa situacio, kiu estas karakterizata de antagonismo inter ekonomio kaj etiko, oni devas prikonsideri la historion de la lastaj 500 jaroj.

Adam Smith (1723-1790) estas konsiderata kiel « la patro » de la klasika ekonomiko. Por li la kunteksto de la ekonomia agado prezentas memreguligan sistemon, kiu donas senchavan tuton sen la reguligo de la ŝtato. Per tia teorio li liveris al la burĝa-kapitalista socio siatempa la meminterpretadon. Tamen malpli konata estas la fakto ke en la komenco li funde pri-traktis etikajn problemojn en la moralfilozofia verko « Teorio de la sentoj » (1759). Poste li volis observi siajn teoriojn sur la kampo de la ekonomio kaj publikigis la rezultojn en « Esploroj pri la naturo kaj la kaŭzoj de la nacia riĉeco » (1776).

La evoluo de la industria socio en la 19a jarcento montris, ke Smith ne povis antaŭvidi la escepte grandan ekonomian prosperon en la jaroj 1840 ĝis 1875 kaj la sociajn problemojn kiujn ĝi kreis. La burĝaro en la urboj akiris riĉecon kaj privilegiojn kaj ne volis cedi parton al la laboristoj, kiuj proletariigis kaj kies sorto komplete dependis de la bontrovo de iliaj mastroj koncerne maldun-

gon pro akcidentoj aŭ malsanoj. Por solvi ĉi tiujn sociajn problemojn oni vidis la alternativon ĉu per reguligo pere de la ŝtato, ĉu per kreo de racia sociordo.

Post la dua mondmilito la ekonomikisto kaj politikisto Ludwig Erhard en Germanio iniciatis la socialan merkatekonomion (« bonstaton por ĉiuj »). Sekve al la implodo de la komunismo en 1989, la liberalismo ricevis novan impulson (Thatcher, Reagan, nov-liberalismo), preskaŭ triumfon. Okazis ekonomikigo de la socio tutmonde. La politikistoj iĝis administrantoj de la « aferdevigoj ». Ekestiĝis konkuro pri enplantado de entreprenoj pere de favoraj kondiĉoj (malaltaj salajroj kaj impostoj, senkosta disponigo de tereno, subvencioj ktp.) fare de la komunumoj aŭ de la ŝtato. Tio kreis novajn sociajn problemojn en regionoj ne povantaj konkuri. Necesus nun reveni al pli civilizita merkatekonomio kaj revigligi la senton civitanan (aŭ respublikan, de la latina « res publica » : publika afero).

Peter Ulrich konklude diris ke la aktuala financa kaj ekonomia krizo tutmonda ne estas esence ekonomia problemo, sed problemo socia. La solvo ne povas veni de la ekonomio, sed estas tasko solvenda fare de la socio kaj de la politiko.

* (G) Nestbeschmutzer : iu kiu parolas malbone pri sia propra lando, medio, korporacio ks. (*rs*)

Piedsignoj de dinosaŭroj




(parc-ela.ch)

(*Swissinfo*) Esploristoj malkovris en la mezgrizona naturparko Ela la tutmonde plej alte lokitajn piedsignojn de dinosaŭroj. La spuroj de rabosaŭro troviĝas en alteco de proksimume 3300 m super la maro kaj aĝas inter 205 kaj 210 milionoj da jaroj. Laŭ komuniko de la Bazela Naturmuzeo ĉi tiuj spuroj malkovriĝis en malfacile alirebla regiono. La piedsignoj kun tri piedfingroj mezuras 40 cm kaj devenas de 4,5 ĝis 7 metroj granda saŭro.

Rilate la longon temas pri la tutmonde plej aĝaj piedsignoj. Ĝis nun oni trovis de la koncerna periodo (205-210 milionoj da jaroj) nur esence malpli grandajn spurojn.

Rimarkinde estas ke ili lokiĝas sur vertikala rokmuro, kies pozicio rezultis el la faldiĝo de la Alpoj. Dum la tempo de ilia estiĝo tie estis plata marstrando tropika. La monto Piz Ela estas la centro de samnoma naturparko, la plej granda en Svisio (600 km²).

La nova trovejo estiĝis proksimume samtempe kiel tiu ĉe la 3159 m alta monto Piz Mitgel (mi'ĉe:l) proksime de Savognin (savo'nji:n), kie oni ankaŭ trovis bone konservitajn piedsignojn de dinosaŭroj, kiujn oni science ekzamenis.



(parc-ela.ch)

CDELI : el la nove katalogitaj libroj

Enprizonigo : krepusko de erao. César Barros Leal ; el la dua portugallingva eldono esperantigis James Rezende Piton; [prezento de Evandro Lins e Silva ; postfina noto de Licínio Barbosa]. Fortaleza : D. Rocha, 2002.

Duamana traduko por la rusa caro : pri 17a-jarcentaj novaĵtradukoj en « Vesti-Kuranty ». Ingrid Maier, Wouter F. Pilger. Lelystad : Vulpo-libroj, 2000.

1. Mai 1929 : der « Blutmai » in Berlin-Neukölln in dem Esperanto-Roman « Metropoliteno » von Wladimir Warankin, übers. von Roland Schnell. Berlin : R. Schnell, 2003. Nachdruck 2003.

Sferoj : scienfikcio kaj fantasto. Grupo nifo; [kompilanto : Miguel Gutierrez Aduriz]. Zaragoza : Hispana Esperanto-Federacio, 1999.

Fakaj aplikoj de esperanto, redaktis Zdeněk Pluhař. Dobřichovice : Kava-Pech, 2001.

Rat-Man. Leo Ortolani ; [desegnisto de la originala rakonto : Andrea Rossetto] ; [tradukado : Cristina de Giorgi... et al.] ; IEJ, Esperanto Jeunes. Partizánske : Espero, 2007.

Contribution à l'étude des apports du yiddish à l'espéranto. Claude

Piron. Tiré à part de : Jewish language review. Haïfa. 1984, n° 4.

Fabeloj de Andersen [Enregistrement sonore], tradukis L. L. Zamenhof ; legas Stano Marček. Martin : S. Marček, 2008-2009.

Lukio aŭ azeno. Lukiano ; el la helena trad. Gerrit Berveling. Chapecó : Fonto, 1988. 2a eldono.

Antologio de la serba skriba poezio [redaktoro kaj tradukinto : Živko Ivanović]. Beograd : Ž. Ivanović, 2002.

La Apokolokintozo de l' Dia Klaŭdio. Seneko ; [trad. el la latina Gerrit Berveling]. Breda : VoKo, 1990.

—ooo—

Fonduso Gacond

Dank' al la malavareco de Claude kaj Andrée Gacond naskiĝis la **Fonduso Gacond** (po 250 frankoj ĉiumonate por aĉeti librojn por CDELI). Zorgas pri tio Richard kaj Martine Schneller. Viaj aĉetproponoj estas bonvenaj !

En septembro 2009 estis aĉetitaj (kaj do troveblaj en CDELI) :

Halldór Laxness. *Sendependaj homoj*.

Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*.

Georges Simenon. *Amiko el la junaĝo de Maigret*.

Geoffrey Sutton. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*.

Paulo Coelho. *La Alkemiisto*.

Recenzojn pri tiuj libroj vi povas trovi en la esperanta gazetaro aŭ per Interreto (ekzemple en la katalogo de UEA).

Bela renkontiĝo dank' al esperanto

Dank' al Martine Schneller, Steve Muriset (komponisto) renkontiĝis kun Luiza Carol (verkistino) kaj el tiu renkontiĝo naskiĝis la verko « Le jour étoilé » (La stelita tago), oratorio prezentota en la Baziliko (« Ruĝa preĝejo ») de Neuchâtel la 11an, 12an kaj 13an de februaro 2010.

Ĉiuj esperantistoj estos bonvenaj !

Kiel atentigis nin Luiza dum la unua pres-konferenco (la 1an de oktobro en la Baziliko), tiu verko estas antaŭ ĉio mesaĝo de espero kaj la ideo mem estas tiu de esperanto.

(Informoj : www.lejouretoile.ch)



(Fotis François Huguenin)

Nia amikino Luiza Carol (abonantino el Israelo) ricevis en Bjalistoko premion por sia eseo « Esperantismo kaj vegetarismo: similaj trajtoj ». Gratulojn al ŝi !

—ooo—

El la oficejo de UEA

UEA lanĉis novajn servojn en Interreto. Meze de majo aperis la unua numero de « UEA viva », 10-minuta filmĵurnalo kun raportetoj pri aktualaĵoj en UEA, TEJO kaj la Centra Oficejo, pri novaj libroj, ktp. Jam aperis du numeroj.

Iom pli frue ekfunkciis reta kinejo, kie eblas jam spekti programerojn de la aprila Malferma Tago de la CO kaj historiajn dokumentojn pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom oni aldonos aliajn filmojn.

« UEA viva » troviĝas en:

<http://www.youtube.com/UEAviva>

La reta kinejo troviĝas en:

<http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

La aperritmo de numeroj de « UEA viva » kaj de novaj filmoj en la reta kinejo dependos de ilia populareco. Mi invitas vin regule rigardi ilin kaj diskonigi ilin! Oni povas finance subteni la produktadon de tiuj novaj servoj per donaco al la konto « video » ĉe UEA. Koran dankon!

Osmo Buller

ĝenerala direktoro de UEA.



Svisa kalendaro

Novembre

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 4 : Luzern : LES-Kunveno.
- 5 : Wil : EKW-Kunveno.
- 7 : Chaux-de-Fonds : Kultura Festo Zamenhof.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 26 : Basel : ESB-Kunveno.
- 26 : Zürich : ESZ-Libera kunveno.

Decembre

- 2 : Luzern : LES-Kunveno.
- 2 : Wil : EKW-Fonduo-vespero.
- 10 : Luzern : LES-Kunveno.
- 11 : Zürich : ESZ-Zamenhofa festo.
- 12 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 12 : Lausanne : LES-Zamenhofa Festo.
- 13 : Basel : Zamenhofa festo.
- 13 : Chaux-de-Fonds : KCE-Zamenhofa tago.
- 13 : Lausanne : Zamenhofa festo.

2010

Januare

- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 6 : Luzern : LES-Kunveno.
- 6 : Wil : EKW-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 10 : Basel : LES-Kunveno.
- 16 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 29 : Zürich : ESZ-Libera kunveno.
- 30-31 : Chaux-de-Fonds : KCE-Asembleo.

Februare

- 1 : Lausanne : LES : Ĝenerala Asembleo.
- 3 : Wil : EKW-Kunveno.
- 20 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 23 : Basel : LES-Karnavalo.
- 25 : Basel : LES-Jarkunveno.
- 25 : Zürich : ESZ-Ĝenerala kunveno.
- 27-28 : Chaux-de-Fonds-KCE : LF-Asembleo.

Marte

- 1 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 3 : Wil : EKW-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 20 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 25 : Basel : LES-Kunveno.
- 25 : Zürich : ESZ-Libera kunveno.

Aprile

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 17 : Ĝenerala Asembleo de *SES*.
- 22 : Basel : LES-Kunveno.
- 24 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Maje

- 3 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 27 : Basel : LES-Kunveno.
- 29 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Junie

- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 19 : Lausanne : LES-Eskurso.
- 24 : Basel : LES-Kunveno Grün'80.

Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 7 aŭ 14 : Basel : LES-Kunveno.

Aŭguste

- 29 : Basel : LES-Eskurso.

Septembre

- 23 : Basel : LES-Kunveno.

Oktobre

- 28 : Basel : LES-Kunveno.

Novembre

- 25 : Basel : LES-Kunveno.